# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 20/10/2022 Sescentdekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 682,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **154,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **138,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018
Nun studas **91,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN
AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

NEKONATA FUNKCIO DE LA CERBETO MALKOVRITA
13-a de oktobro 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

*Roger Springer*



# Skribu pri via klubo





## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 15a de oktobro estis la tria sabato. Venis Roger,Chris kaj John *Roger Springer*

## El Goma, Respubliko Demokratia Kongo




Saluton gesamideanoj,

Post atendado nun malfrue - antaŭ tri semajnoj la nova studjaro komenciĝis - finfine ANF disdonis al kelkaj infanoj la lernomaterialojn, dank' al viaj helpoj. Bedaŭrinde ni ne povis disdoni al ĉiuj prizorgataj infanoj niaj.

Pro tio esperante , ni kiel ĉiam etendas la manojn al vi helpantoj , por servi la aliajn infanojn nericevintajn. Ni ankaŭ ekpagos la lernejajn kotizojn.

Ni estus tre dankemaj se ĉiu de vi pludonus la informojn kaj / aŭ mondonacus iom por kovri rapidege nian buĝeton.

Ni agadas en la urbo Goma, Respubliko Demokratia Kongo.

Ni kontakteblas ĉe: orfojkongo@gmail.com

Kore Betti kaj Augustin *Augustin KAKOZWA*



# La Komuna Bonfarta Salono

Je la 9a de Oktobro 2022, en Torquay, Viktorio, la membroj de Melburno Klubo inkluzive trejnojn, Esther kaj Patrick ĝuis la tagmanĝon, kaj provlegon de du teatraĵoj, kiuj estis faritaj de Oscar, Gary kaj Marumi.

Ni kantis mondpac-kanton en Esperanto kaj iomete en Ukraina lingvo, ĉar ni havis vizitantinon Larissa el Lviv, Ukrainio.

La bonfarta-salono daŭris ĉe la Bird Rock kafejo kun la samideanoj, lokaj homoj poste.

Charles Stevenson el sud-Australio parolis pri la interesa vivo de sia pasinta lingva-genia amiko Daniel Kane.

Heather kaj Jo parolis pri la E-movado; Jenny Funston (Geelong) pri la mond-paco en ligo de japana grupo 'Blanka Lumo Asocio' kies ĉefsidejo estas apud Monto Fuji.

Loka verkisto Jo Curtain parolis pri sia kreiva arto de miksita amaskomunikilo.

Ĉiuj iris hejmen kun grandaj ridetoj. Ni kore dankas al ĉiuj kiuj partoprenis!

MEK *Marumi Smith* (Torquay) 17 Oktobro 2022



Esperanto-Tagmango Torquay Vic
9a de oktobro 2022



Charles Stevenson



Joanne Johns



Angelo injektis Oxytocin



Trejnante teatraĵon

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



# Ĉu la nuna generacio pli kruelas ?

# APERAS TIEL .

Nuntempe aperas en la mondo mortigoj evidente nur por ĝui, ofte multpersone, la mortigon ante al aliaj, senkulpaj homoj. Eĉ se, por kontentigi siajn amikojn, oni senkiale kulpigas religion aŭ naciecon.

En antaŭaj generacioj oni murdis ĉiam pro tialo, neniam sentiale. Eĉ por murdi protestantojn, la katolikoj havis la tialon ke, se ne, la katolika eklezio eble mortos. Ne estis pro la plezuro de la mortigado. Eĉ por mortigi la senkulpajn islamanojn dum la Krucmilitoj oni ne simple faris tion por ĝojo. Eĉ por la vastaj murdadoj unue en Pakistano kaj poste en Afganistano, ekzistis tialoj. K.t.p., k.t.p. Sed ŝajnas ke nun okazas homomurdoj nur por la plezuro de la hommortigado. *Marcel Leereveld.*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



En la kazo de nuklea milito inter Usono kaj Ĉinujo, la neceso estas fikcia, se landoj kiaj Aŭstralio estus sendependaj nacioj. Antaŭ pluraj jaroj plej multaj landoj subskribis pakton de la Unuiĝintaj Nacioj ke la landoj ne havos sur sia sojlo nukleajn armilojn, ĉar nuklea milito kruele detruus parton de la homaro. Sed Aŭstralio ne estas unu el tiaj landoj, ĉar ĝi vendis sin al Usono. Por siaj propraj ekzistoj estus pli avantaĝa por Aŭstralio kaj kelkaj aliaj landoj simple esti provincoj de Usono. Kia la stato estas nun, ni kaj la aliaj faros la malpuran laboron por Usono kiu foriros el la milita centro. Kompreneble la ĉinoj scias tion, sed ne kapablas fari la samon, ĉar ne ekzistas satelitaj landoj por fari la malpuran laboron por Ĉinujo. Do se milito okazos, estos Usono kiu komencos ĝin.
*Marcel Leereveld.*

"Esti malamiko de Ameriko povas esti danĝera, sed esti amiko estas fatala." *Kissinger*



Diskutis du sciencistoj siajn plej novajn metodojn de esplorado. Diris unu el ili. “Ni enkondukis ion tute novan en niajn laboratoriojn. Nuntempe ni ne plu uzadas ratojn por niaj eksperimentoj. Ni anstataŭigis ilin per katoj, advokatoj.”



Ĉu vere per advokatoj?” diris la alia sciencisto. “Kion vi gajnos per tio?”

“Nu,” respondis la unua sciencisto, oni iel ekamas la ratojn pli ol advokatojn, ĉu ne?” *Bob Felby*

**3ZZZ** … la elsendo de la 17a de oktobro 2022 estas ĉefe dediĉita al literaturo ( Orest Kuzma, Kit Kelen, aŭstralia poeto kaj Laŭre Patas d’Illiers) .





Ne forgesu donaci iom da mono por la radiotono kaj pensu pri membriĝo al la grupo Esperanto en 3zzz. La teamo antaŭdankas



*Franciska Toubale*